
Numero: 283.
Decembro: 2015. 23-a jarkolekto

# Literaturaj Folioj

# VESPERTO



Redaktanto
Apáti Kovács Béla
Kaposvár, Béla király u. 44. HU-7400
Telefono: 06/20/497-03-64
Retadreso: apatikb111@gmail.com
Eldonanto: KAPOŜVARA ESPERANTO-CENTRO
Lingve kontrolis: Erzsébet Tuboly

# Kristnasko sen neĝo

Eble ankaŭ ĉi vintre Kristnasko estos sen neĝo, kiel ĉiam en la lastaj jaroj.

Onidire tion kaŭzas la tuttera varmiĝo. La norda kaj la suda polusoj rapide degelas. Ni homoj malpurigas nian terglobon. Ĉio okazas pro ni homoj.

Terure! – se ĝi estas vera.

Ekzistas sciencistoj kiuj asertas, tiu ĉi fenomeno estas perioda kaj jam en la historio de Tero estis simila varmiĝo.

Al kiu ni kredu? Ĉu efektive nian terglobon minacas ĝis nun nevidita katastrofo?

Katastrofoj ĉiam estis kaj estos. Ilin elimini por ĉiam oni ne povas. Ni devas vivi kun tiu ĉi penso. Sed ni povas plimalgrandigi la sencon, ke ili ne realiĝu.

Komprenble estus vivi en tia mondo, kie estas eterna sekureco.

Nia tasko konservi nian terglobon ankaŭ por la estonto. Mi scias, tio ĉi ne estas facila afero.

Unue ni devus ellerni la pacan kunvivadon unu kun la alia.

Pri tio ĉi temas la mesaĝo de Kristnasko. Dum tiu ĉi festo ĉiu homo tutkore volu la pacon. Ni forpelu al nia animo la malamon.

Kompreneble ne sufiĉas unuflanke deziri tion ĉi. Ĉiu homo - ne gravas haŭtokoloro, lingvo, religio, politika aperteno - devas voli la pacon.

La homaro tiam fariĝos plenaĝulo, se sincere deziras la pacan kunvivadon unu kun la alia. Se tiu ĉi interna voĉo ne eksonas en nia animo, tiam ne alvenas la atendata paco. Ĝis tiam ĉiam restos terenoj, kie la homoj militos, murdos unu la alian.

Mia deziro estas plenaĝiĝi kaj vivi en paco.

Mi deziras al ĉiu kara Leganto de Vesperto pacan, agrablan Kristnaskon kaj prosperan novan jaron por 2016.

**-Redaktanto-**



# Cezar
## Pacon ne nur je Kristnasko

Festa familio sidis
apud kristnaskarb' en rond',
kaj neniu tie fridis,
kvankam fridis en la mond'.
Ekjubilis kun favor'
kantoĥor' !

Avo faris festprogramon
kun avino ĉe la flank'.
Ĉiuj sentis iel amon
kaj aplaŭdis tre pro dank'.
Kiam frapis ĉe la pord'
nun kun fort'.

Nikolao mem envenis,
ruĝvestita por la fest'.
Parolante ĉiujn benis,
tre ŝvitante sub la vest' :
„Pacan feston en konkord' !
Mia vort' !"

Sed malgranda knab' sur loko
sin tredadis per pied',
siajn vortojn nur post voko
metis flustre kvazaŭ pet'.
Li demandis kun dolor'
post esplor' :


Kara Nikolao mia,
mankas al la vortoj klar'.
Pacon nur dum festo nia ?
Kial ne dum tuta jar' ?
Kial pacon, ho, sinjor',
nur dum hor' ?

Sankta Nikolao miris,
staris iom en silent',
ĝis li tre solene diris
„Ho, mi estas en konsent'.
Pacon ĉiam kun fervor',
knab' el or' !"

# Aventuroj sur Luno

-Verkis: Apáti Kovács Béla-
XVIII-a

La tribano rapide decidis pri ilia sorto. La tuta proceso ne daŭris dek minutojn. La juĝisto sciigis la akuzon kontraŭ ili ambaŭ. Ne eblis apelacii. Tiu ĉi peko estis la plej granda sur Luno. Ili tuj estos ekzelataj al la plando Pluto.



Kun Johano turnis la mondo. Li preskaŭ svenis kaj diradis, kiel frenezulo:

-Mi nur sonĝas. Mi nur sonĝas. Tio ĉi ne povas esti vera. Mi tuj vekiĝos.

Ŝajne la onklino Izabela staris apud li trankvile, kvazaŭ nenio estus okazinta.

Johano ĵetis al ŝi rigardon. Li deziris demandi de ŝi ion, sed voĉo ne povis forlasi liajn lipojn pro la timego.

La juĝisto kaj la ĉeestantoj indiferente rigardis ilin. Certe ili ofte vidis similajn eventojn kaj dum jaroj ĝi hardis ilian koron.

Preskaŭ ĉiutage okazis tiaj krimliveradoj kaj jam en la karcero kolektiĝis kondamnitoj. Ĉiu liverado konsistis el dudek personoj. Onidire jam nur unu mankis ekirigi ilin al Pluto per speciala kosmoŝipo. Sur ĝia ferdeko ne estas personaro, nur robotoj. Fuĝi el ĝi estas neebla. Je la unua plej eta signo la robotsoldatoj tuj pereigus la tutan vojaĝantaron. Estus stultaĵo kredi, ke iu sukcesus akiri la kosmoŝipon kaj kiel piratoŝipo vagadi en la kosmo.



Ĝi estis la unua regulo, kion oni sciigis al ili.

Ĉiu sciis, el la kondamnitoj baldaŭe eble post kelkaj horoj ankaŭ la mankanta persono alvenos kaj komenciĝis ilia punvojaĝo al tiu fora, senviva planedo, kie ili devos labori ĝismorte en iu minejo. Ĉiu bone scias, tie la kondamnitoj vivos nur unu aŭ du jarojn. Pro la teruraj laborkondiĉoj oni rapide mortas. Se tamen iu sukcesus transvivi pli multe da jaroj, tiam li aŭ ŝi propramane murdas sin, ĉar freneziĝos.

Bone konate en ĉiu minejoj, laborejoj ĉie estas atingeblaj sinmortigiloj: venenoj, elektra kurento, pendumilo, eĉ diversaj armiloj ktp. Oni nun pensus la kondamnitoj povus akiri la potencon kaj poste organizi la liberiĝon. Sed kiel sur la ferdeko de la kosmoŝipo ankaŭ sur la planedo Pluto estas nur robotoj. Se hazarde tamen erupcius ribelo, tiuj tuj subpremus ĝin. La pafado estas permesata unu kontraŭ la alia. La kondamnitoj rajtas mortpafi unu la alian, eĉ ĝi estas rekomendita. Kiu mortpafas iun li aŭ ŝi akiros la nutraĵon de la alia homo. Tiutage la venkinto povas manĝi multe. Eble alitage li estos ĉasata.



Tia sorto atendis Johanon kaj Izabelan. La onklino tion ĉi bone sciis. Ja ŝi jam ofte legis kaj aŭdis pri ĝi. Sed Johano nur suspektis kaj tiu ĉi sento estis tre doloriga por li.

Johanon surprizis la trankvilo de Izabela. Ŝi nek protestis, kiel aliaj kondamnitoj, nek ploris, nek kriegadis. Ŝi nur ridetis kvazaŭ ŝi ĝojus al tiu ĉi kondamno.

Oni gvidis ilin sub la konstruaĵo. Nenie ili vidis kradojn aŭ forte ŝlositajn pordojn.

Por Johano ekbrilis iom da espero kaj irante malsupren sur la ŝtuparo li flustris al sia onklino.

-Ni provu rifuĝi el la konstruaĵo!

-Johaĉjo, ne estu stulteta! Ĉu vi forĵetus tian grandiozan eblon por vojaĝi al la planedo Pluto? – ŝi diris kaj ŝi komencis laŭte ridegi.

La gardisto devis averti ŝin, ke tie ĉi ne decas ridegi. Estus pli bone, se ŝi tuj silentiĝus.

Certe pro la granda ŝoko la onklino freneziĝis kaj ŝi ne scias, kion faras kaj parolas – pensis Johano kaj li unutone paŝadis malsupren dume li pensis konstante pri sia karulino Elinjo.

Li jam ne vidos ŝin plurfoje kaj ilia amo finiĝis por ĉiam, kvankam kiom belega estis.

Lin ploro sufokadis.

(-daŭrigota-)

# Poezio

# Poezio

**Tintilar'**
*(Jingle Bells)*

*Glitante sur la neĝ',*
*malantaŭ solĉeval'*
*Rapide iras ni*
*sur kampo kaj en val'.*
*Sur la ĉevala vost'*
*gajigas tintilar';*
*Glitrajdo kaj kantado estas*
*Ĝojo sen kompar'!*

*(Ho...) Tintilar', tintilar',*
*tintu sur la voj'.*
*Rajdi en glitveturil'*
*ho kia granda ĝoj-o;*
*Tintilar', tintilar',*
*tintu sur la voj'*
*Rajdi en glitveturil'*
*ho kia granda ĝoj'!*

*Semajnon antaŭ nun*
*glitrajdi iris ni,*
*Fraŭlino Fani Brajt*
*kaj tutapude mi.*
*Sed nia ĉevalaĉ',*
*lin trafis malfeliĉ'...*
*Li tiris nin sur neĝmontet'*
*kaj sekvis renversiĝ'!*

*(Ho...) Tintilar',...*



**L' abio**
**(Ach, Tannenbaum!)**

*Abio vi, abio vi,*
*Kun foliar' fidela!*
*Abio vi, abio vi,*
*Kun foliar' fidela!*
*Vi verdas ne nur en somer'*
*Sed eĉ dum vintra neĝveter'.*
*Abio vi, abio vi,*
*Kun foliar' fidela!*

*Abio vi, abio vi,*
*Vin kreis Di' eterna;*
*Abio vi, abio vi,*
*Vin kreis Di' eterna;*
*Simbolo de la ama Hel'*
*Kiun Di' radias en Ĉiel'.*
*Abio vi, abio vi,*
*Vin kreis Di' eterna.*



**Sankta Nokt'**
**(Stille Nacht)**
*Paca nokt', sankta nokt',*
*Brila lum' sur la mont';*
*Jen la Infano kun ama Patrin';*
*Dolĉe Ŝi flustras lulante Lin,*
*"Dormu en ĉiela trankvil',*
*Dormu en ĉiela trankvil'."*

# Por infanoj

## Peĉjo kaj la pinarbo



Peĉjo estis malgranda knabeto. Li havis nek patron, nek patrinon. La malfeliĉa knabeto vivis kun sia avino.

En la vilaĝo oni prepariĝis je Kristnasko. En ĉiu domo oni kuiris, bakis kaj bonodoro ŝvebis en la tuta strato.

La avino de Peĉjo estis tre malriĉa. Granda problemo estis akiri nutraĵon sur la tablon.

Ĉi jare por ili Jesueto ne povos alporti bele ornamitan pinarbon. Estos bone, se avino povos baki iom da kuko por la vespero.

Peĉjo bone sciis tion kaj pro tio la knabeto estis tre malĝoja.

Proksime al ilia domo estis arbaro. Li ofte iris tien. Antaŭ Kristnasko Peĉjo ekskursis tien sola, kaj revante rigardis la tieajn pinarbojn. Subite li ekĝemis:

-Ho, se ankaŭ en nia domo estus tia bela pinarbo!

Li ne rimarkis, kiam neatendite el liaj okuloj larmogutoj ruliĝis tra la vango.

Tion ĉi ekvidis malgranda pinarbo kaj mire demandis:



-Knabeto, kial vi ploras?

Peĉjo ektimis, ĉar ankoraŭ ne vidis parolantan arbon.

-Mi ploras. Mia malĝojo estas tre granda. Ĉi Kristnaske mi ne havos bele ornamitan pinarbon. Mi kaj mia avino estas tre malicaj. Avino ne povas aĉeti ĝin.

-Ĉu vi estis bona infano? – demandis la pinarbo.

-Jes, mi ĉiam helpis al mia kara avino. Liaj piedoj ofte dolorigis ŝin. Mi purigis la domon. Mi nutris la kokinojn kaj aliajn dombestojn. Mi ĉiam estis obeema, kiam avino mia petis tion. Tamen Jesueto ne alportos por mi bele ornamitan pinarbon. Ĉu vi ne estus malgaja en mia situacio?

La malgranda pinarbo longe silentis. Fine li konsentis kun la knabeto. Ĝi diris al li post iom da tempo.

-Iru hejmen kaj kredu, ke Jesueto ne forgesiĝos pri vi. Certe li premios vin, se vi estis bona infano. Mi proponas al vi, ankaŭ en la estonto estu bona, obeema knabeto kaj ĉiam helpu vian karan avinon.

La malgranda pinarbo ne povis trankviligi lin. Hejmenirante dum la vojo Peĉjo senĉese ploretis. Ankaŭ vespere li estis silenta. La avino vane demandis kio okazis al li, la knabeto ne permesis la kaŭzon de la malĝojo.

Li enlitiĝis kaj li longe ĝemadis ĝis li endormiĝis.

Alvenis la tago de Kristnasko. La vilaĝo silentiĝis kaj el ĉiu domo belegaj kantoj aŭdiĝis.

Nur en ilia domo estis malhelo kaj silento. La avino silente sidis en la kuirejo apud la forno kaj ŝi preĝis. Peĉjo pretiĝis enlitiĝi. Antaŭ ol kuŝiĝi en la liton li rigardis trans la fenestro.

Unue li vidis nenion. Ekstere neĝis kaj estis frosto. Liaj okuloj denove pleniĝis kun larmogutoj. Lin ne vizitos Jesueto kaj li ne havos bele ornamitan pinarbon.

La geknaboj ĝojegas en la aliaj domoj. Certe ĉiu ricevas multe da donacoj. Ili staras ĉe la pinarbo kaj kantas aŭ preĝas.

Nur li estas sola kaj trista.

Subite tia afero okazis pri kio li ne pensis. En la malhelo io ekmovis. Unue li pensis, ke li halucinas.

Bestoj venis el la arbaro kaj ili portis bele ornamitan pinarbon. Ĝi estis tiu pinarbo kun kiu li parolis

Lia koro rapidege komencis pulsadi. Kion li vidas, tio ne estas halucinado. La bestoj portas por li bele ornamitan pinarbon. Sur ĝi estis multe da arbaraj fruktoj, sekigitaj floroj kaj ĉio, kion kaŝas la naturo.

La bestoj portis ne nur pinarbon, sed ankaŭ donacon.

Peĉjo estis feliĉa kaj laŭte ekkriis:

-Avinjo, ankaŭ mi havos bele ornamitan pinarbon. Jesueto vizitis ankaŭ min.

**-Onklo Adalberto-**



***Benitan Kristnaskon kaj prosperan novan jaron por 2015***

# Kristnaska etoso

Kristnaska etoso











